


1. La bela knabino estas en danĝero. Kial?
2. Kion faris la fiaĉulo? Kion volas fari la heroo?
3. Kio venas ĉirkaŭ la monto? Kio finiĝas ĉe lago?
4. Kiuj forkuras de la bela knabino? Kiaj ili aspektas?
5. Kiu kuras al la ŝanĝ-trako? Kiu staras apud fotilo?
6. De kie venas la ministoj? Kion li demandas? Kiulingve? Kion respondas la viro kun la granda stomako, mallonga pantalono kaj haraj genuoj? Kiulingve li parolas? Kiun eraron faris la ministoj?
7. Se la heroo sukcesos ŝanĝi la ŝanĝ-trakon, kio okazos?
8. Se la heroo ne sukcesos atingi la ŝanĝ-trakon, kio okazos?
9. Laŭ via opinio, kio okazos post unu minuto?

# Juna amiko

Nov. 88/4  
N-ro 47 jaro 15a

INTERNACIA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO



*Juna amiko*, revuo por lernejanoj kaj komencantoj. Eldonata de la Hungara Esperanto-Asocio kaj aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembro kaj novembre.

Redaktoro kaj grafiko: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario.

Kovrilo: Csilla Borovszki.



Nemzetközi esperantó diáklap. Megjelenik évente négyszer. Ára: 10 ft.: 88/4 szám, XV évfolyam. Felelős szerk.: Schüller Judith. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapeŝt. Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a MESZ Sokszorosítottban: hearota 88-187. Kiad. eng. szám: III/IFJ/30/1976;

ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hirdapkézbesítő postahivatalnál, a hirdapkézbesítőknél, a Posta hirdapüzleteiben és a Hirdap-előfizetési és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapeŝt, XIII, Lehel u. 10/a, 1900 - közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra.

**Fanfaro:** Trumpetoj anoncas demandon. Kio estis 6 antaŭ du jaroj, 145 lastjare kaj 450 nun? Ne, ne la kurzo de la forinto kontraŭ la dolaro. Temas pri la nombro de niaj abonantoj en okcidentaj landoj. Temas pri pruvo, ke nia legantaro pli kaj pli tutmondiĝas. Detalojn pri tio vi trovos sur p. 11, komence de kvarpaĝa varbilo por *Juna amiko*, kiun ni decidis aperigi en la revuo mem. Kiu volas varbi por ni novajn legantojn por 1989 rajtas peti de HEA apartan stokon de tiuj kvar paĝoj.

**Fanfarono?** Ĉu pro tiu kresko fanfaronas la redakcio? Nu, iomete. Sed ni samtempe konfesas, ke la kresko okazis en landoj, kie peranto por ni aktivas, aŭ plej ofte ekaktivas: ekz. s-ro Paul Hewitt en Britio, s-ino Lisbeth Andreasson en Svedio, s-ino Terezija Kapista en Jugoslavio, UFE en Francio, BEL en Brazilo, ELNA en Usono kaj UEA internacie. Ni kore dankas ĉiujn (ne nur la ĵus nomitajn!) kaj esperas je pli grandaj sukcesoj estonte.

**Fanfaronado:** Dum ĉi tiu jaro la nombro de legantoj tiom altiĝis, ke kelkfoje ni ne povis tuj plenumi ĉiujn mendojn, sed devis atendi redonon de ekzempleroj el gazet-butikoj tra Hungario, kie oni vendas ilin. Al la ne tuj kontentigitaj legantoj ni pardonpetas. Por ke tio estonte ne okazu ni jam altigis la eldonkvanton ĝis 4000. Per tio nia eta *Juna amiko* iĝas unu el la plej grandnombre eldonataj Esperanto-revuoj. Pri tio ni senhonte fanfaronas. Kiuj revuoj aperas en pli da ekzempleroj ol ni? Kompreneble, *Esperanto*, la oficiala organo de UEA kaj supozeble *El popola ĉinio*. Ĉu iu alia revuo havas pli ol 3500 pagitajn abonantojn kaj eldonkvanton pli ol 4000? Bonvolu informi nin, ĉar preskaŭ ne decas tiom senhonte fanfaroni.

**Infanfardo:** Granda parto de ĉi tiu numero estas uzata por doni al niaj iom junaj legantoj praktikan ludon. Jes, nia plej ambicia rol-ludo ĝis nun, kun dupaĝa enkonduko, mapo, ligita krucvortenigmo kaj instrukcioj por ĉiuj el la 12 roluloj. Bonvolu, iru vivi kelkajn horojn en la majesta metropolo Perturbo!

smg 880912

## Por la etuloj:

*Teatraĵeto kun kvin roluloj laŭ usona popolrakonto*

# La eta ruĝa kokino

**Anoncisto:** Iam vivis eta ruĝa kokino kaj siaj kokidoj. Dum ŝi serĉis en la korto por manĝaĵo, ŝi trovis grajnon de tritiko. Ŝi decidis kreskigi ĝin.

**Kokino:** Kiu helpos min planti la tritikon?

**Porko:** Mi estas tro okupata.

**Hundo:** Mi ne volas malpurigi miajn piedojn pro fosado.

**Ĉevalo:** Grajno de tritiko ne gravas. Mi ne helpos!

**Kokino:** Do, mi mem plantos ĝin!

**Anoncisto:** Ŝi plantis ĝin. Poste la tritiko kreskis kaj portis multajn grajnoj.

**Kokino:** Nun estas tempo mueli la tritikon por fari farunon. Kiu helpos?

**Porko:** Ne mi.

**Hundo:** Mi preferas kuŝi en la sunbrilo.

**Ĉevalo:** Mi estas tro okupata.

**Kokino:** Do, mi mem muelos la tritikon.

**Anoncisto:** Ŝi muelis la tritikon.

**Kokino:** Kiu helpos min fari la kukon?

**Porko:** Mi estas tro laca.

**Hundo:** Mi ne estas kuiristo.

**Ĉevalo:** Mi havas aliajn devojn.

**Kokino:** Do, mi mem faros la kukon.

**Anoncisto:** Ŝi faris la kukon.

**Kokino:** Kiu helpos min manĝi la kukon?

**Porko:** Mi!

**Hundo:** Mi!

**Ĉevalo:** Mi helpos manĝi ĝin!

**Kokino:** Ne, ne. Nur mi kaj miaj kokidoj manĝos la kukon!



**Anoncisto:** Kaj ili ja manĝis ĝin!



*R. Kent Jones, Ĉikago, Usono.*

Kion la kokino volis planti?  
Kial la hundo ne volis helpi?  
Kiel oni faras farunon?  
Kial la hundo ne volis helpi pri tio?

Kial la ĉevalo ne helpis fari la kukon?  
Kial la porko ne helpis? Kaj la hundo?  
Pri kio ĉiu volis helpi?  
Kio estas la mesaĝo de la rakonto?



Finna popol-kanto

## TRI KORNIKOJ



1. Tri kornikoj jen, sur barilo jen.



Sili-va-ti sej-la, u-nu flugas for.  
sili-va-ti sej-la,

1. Tri kornikoj jen,  
sur barilo jen.  
Silivati sejla,  
silivati sejla,  
unu flugas for.

2. Du kornikoj nun,  
sur barilo nun.  
Silivati sejla,  
silivati sejla,  
unu flugas for.

3. Unu korniko nur,  
sur barilo nur.

Silivati sejla,  
silivati sejla, ĝi  
ankaŭ flugas for.

4. Tri kornikoj sidis,  
sur barilo sidis.  
Silivati sejla,  
silivati sejla,  
ĉiuj flugis for.

*Sendis Sylvia Hämaläinen,  
Tampere, Finnlando  
Muziknotojn desegnis Franz-Georg  
Rössler, FR Germanio*

# PERTURBO!


Rol-ludo por dek du personoj

Perturbo estis, ĝis antaŭ unu semajno, paca, trankvila urbo sur la okcidenta ebenaĵo de Juglando. Ĝi ne estas la ĉefurbo, ĝi eĉ ne estas tre granda. (Se ĝi estus tre granda, ĝi ne estus paca.) Ĝi estas mezgranda urbo. La ĉefurbo estas, kompreneble, granda urbo, kaj ĝi troviĝas en la orienta parto de Juglando. Tamen, Perturbo estas la plej granda urbo en la okcidenta parto de Juglando. Sed ĝi ne estas la dua plej granda urbo en Juglando. Tiun honoron havas Kukurbo, la plej granda urbo en la sudo de Juglando.

Perturbo havas urbestron. Ĝi havas ankaŭ urbestraron. Tiu estraro ne estas kontenta. Ĝi volas, ke Perturbo estu pli granda. Ĝi volas, ke ĝi grandiĝu. Ju pli ĝi grandiĝos, des pli ili kontentiĝos. Ili volas, ke ĝi iĝu la dua plej granda urbo en Juglando.

Antaŭ unu jaro la Ministro pri Kulturo kaj Koncertejoj anoncis en la parlamento (en la ĉefurbo, kompreneble), ke oni planas konstrui ie en la lando duan koncertejon. Unu jam ekzistas, la ŝtata koncertejo (en la ĉefurbo, kompreneble). Li anoncis, ke oni konstruos unu grandan, luksan, belan koncertejon, ie en la provincoj.

Do, la urbestranaroj de Perturbo tuj vekis la urbestron de Perturbo, kiu tuj saltis en la nigran limuzinon de Perturbo kaj rapidis al la ĉefurbo por insisti, ke la koncertejo staru en Perturbo. Samtempe la urbestranaroj de Kukurbo vekis sian urbestron kaj li saltis same tuj en sian ruĝan helikopteron por rapidi al la ĉefurbo kaj insisti, ke la koncertejo staru en Kukurbo. Nur ĉar la urbestro de Kukurbo dormas multe pli profunde ol tiu de Perturbo, kaj ĉar la nigra limuzino estas aparte moderna kaj rapida, dum la ruĝa helikoptero estas aparte malmoderna kaj malrapida, ili ambaŭ atingis la pordon de la Ministro en la sama momento.



La urbestro de Perturbo frapis la pordon kaj la urbestron de Kukurbo. La urbestro de Kukurbo en la sama momento frapis la pordon kaj la urbestron de Perturbo.

”Envenu! Envenu!” kriis la Ministro. Sed neniu envenis. Do, li eliris kaj trovis du senkonsciajn urbestrojn sur la mato antaŭ la ministeria pordo.

Ene de la posta jaro ĝis nun, la du urbestroj ne nur rekonsciigis, sed ankaŭ vigle batalis. Eble ni rakontos al vi detale pri tio alian fojon — eble vi mem verkos pri tio, laŭ nia suba invito — ĉiuokaze, la fina rezulto estis gajno por Perturbo. La Ministro decidis, ke la koncertejo staros en Perturbo, kondiĉe, ke ili elektu taŭgan lokon en la urbo por ĝi.

La urbestro, urbestraro kaj urbanoj de Perturbo ĝojis kaj festis. Sekvos nova epoko: ora erao. Venos al la urbo famaj kantistoj, riĉaj turistoj, la televido, ĵurnalistoj, violon-faristoj kaj hamurger-vendistoj pro tiu nova koncertejo. Krome la konstruistoj de la urbo havos multan laboron — la arĥitektoj kaj la fabrikistoj de brikoj, fero, betono kaj vitro estos kontentaj. La urbo progresos kaj kreskos. Baldaŭ ĝi iĝos la plej granda urbo en la lando. Ondo da ĝojo karesis la tutan urbanaron. Feliĉa fino al la rakonto?

Nu, ne precize, ĉar hodiaŭ en la urbodomo okazos grava kunsido, por decidi, en kiu urbo-parto de Perturbo oni konstruos la koncertejon. La kunsidon partoprenos dek membroj de la Urba Estraro, la supera organo de Perturbo. Prezidos la urbestro — la heroo de la koncerteja projekto.


La Estrara Raport-Sekretario havas la pretan kontrakton kun plumo kaj inko por subskribi ĉion fine de la rol-ludo. Tial, ĉeestos la Ministro pri Kulturo kaj Koncertejoj, kaj alvenos unu malfrua partoprenanto, kiun la Ministro sekrete invitis. Sur la muro pendas granda mapo de la urbo.

La personoj en via Esperanto-grupo havas la taskon krei teatraĵon. La scenejo estas la urbo-domo. Sur la apuda paĝo vi trovos mapon de Perturbo; kelkaj grupanoj redeseĝnu ĝin multe pli grande. Grupanoj iĝos la aktoroj, vi estos la estraranoj, kiuj diskutos en la kunveno, en kiu parto de la urbo devos stari la koncertejo. Vi ĉiuj havas propran rolon kaj opinion, kie ĝi staru. Sur postaj paĝoj de la revuo vi povos legi viajn instrukciojn. Post disdono de la roloj, legu nur la instrukciojn por via propra rolo; ne legu tiujn de la aliaj!

La prezidanto malfermos la kunsidon, klarigos ĝian celon kaj petos ĉiun grupanon prezenti sin mallonge. Li decidis komence kiomlonge daŭros la diskutado (20 minutoj?) kaj fine de la diskuto li kaj la Ministro devos kune decidi laŭ la donitaj argumentoj, kie staros la koncertejo. Tuj antaŭ la decido, la Estrara Raport-Sekretario, kiu havas dikan not-libron, donos du-minutan resumon de la diskuto. Se kelkaj malkontentos pri tiu resumo aŭ kun la decido, oni rajtas pludiskuti ankoraŭ dum dek minutoj, sed post tio la Urbestro kaj la Ministro faros definitivan kaj firman decidon.

# MAPO DE LA SENKOMPAREBLE BELA PERTURBO

Skalo: 0 1 2km



SMS

## Perturba krucvorttenigmo

1	2	3	4		5		6	7	8	
	9						10			↙
11		12		13		14				
15	16		17			18			19	
20		21		22	23			24		
25							26			
27				28		29		30		
31			32			33		34		
		35					36			
37	38			39				40	41	
42							43			

(R) = Uzu nur la radikon

### Horizontale

1. LA KAŜFRAZO: La esenca demando de la kunsido.
9. "La ekstera aspekto estos majesta, la \_\_\_\_\_ grandioza!"
10. Anton Diab estas \_\_\_\_\_ artisto.
12. La voĉo de Natali estas inter la plej belaj de la \_\_\_\_\_. (R)
15. Perturbo troviĝas \_\_\_\_\_ la okcidenta parto de Juglando.
17. La ĉefurbo estas pli granda \_\_\_\_\_ Perturbo.
18. La Ministro verŝis akvon sur la du urbestroj kaj ili \_\_\_\_\_-konsciigis.
19. Oni kunsidis dek-\_\_\_\_\_e.
20. La urba sekretario havas dikan \_\_\_\_\_-libron.
22. La \_\_\_\_\_ hotelo de la urbo estas senstela.
24. La landkodo de la devenlando de la sindikatestro, s-ro Sisto.
25. La kunsido iĝos tre brua, se ĉiu komencos \_\_\_\_\_ laŭte.



26. En ĉiu vazo staros nur unu floro. Do, la floroj estos aranĝitaj \_\_\_\_.
27. S-ro Diaf komponos poemon: "Odo al nia urbo."
28. "Urbestro, vekigu! Ni ĵus aŭdis, ke oni intencas konstrui koncertejon en iu provinca urbo. Necesas, ke vi tuj \_\_\_\_ al la ĉefurbo!"
30. Decidis la Ministro \_\_\_\_ la Urbestro.
31. La parlamento \_\_\_\_ troviĝas en Perturbo.
32. S-ro Ardul preparis \_\_\_\_-modernan planon.
34. La urbestro kune decidis: " \_\_\_\_ volas la koncertejon en Perturbo!"
35. La ĉefurbo troviĝas pli \_\_\_\_ ol Perturbo.
37. Oni ne povos konstrui la koncertejon apud la rivero, kiom \_\_\_\_ belaj estas ĝiaj bordoj.
39. Ministro estas \_\_\_\_ de la Registaro, la Parlamento kaj la Nacia Estraro.
40. Trajno, limuzino kaj tramo veturas per \_\_\_\_; helikopteroj kaj ŝipoj veturas sen ili. (R)
42. Kukurbo troviĝas \_\_\_\_ en Juglando.
43. La tero apud la rivero estas tro \_\_\_\_.
13. S-ro Ardul povos firmigi la teron apud la rivero per speciala ilo.
14. Sekvos nova epoko; ora \_\_\_\_\_. (R)
16. La granda parko troviĝas \_\_\_\_\_ en la urbo.
19. La urbestro estas la supera \_\_\_\_\_ de Perturbo. (R)
21. Oni rajtas diskuti denove dum dek minutoj, sed post \_\_\_\_\_, la Ministro kaj la Urbestro decidis definitive.
23. La \_\_\_\_\_ estos okra laŭ s-ro Ardul, purpura laŭ f-ino Kar.



## Vertikale

2. Oni decidis konstrui koncertejon \_\_\_\_ en la provincoj, sen decidi precize kie.
3. Ĝis nun estas nur \_\_\_\_ koncertejoj en Juglando.
4. Necesas por vivi ne nur \_\_\_\_\_, sed ankaŭ kulturo.
5. La voĉo de f-ino Kar estas \_\_\_\_ bela. (R)
6. S-ro Ardul imagas la kurtenon \_\_\_\_\_.
7. Estrara Raport-Sekretario (mallongigo).
8. \_\_\_\_ kelkaj malkonsentas pri la unua decido, oni diskutos la demandon ankoraufoje.
11. La estraranoj \_\_\_\_\_ kaj salutas unu la alian komence de la kunveno.
24. Oni subskribos la kontrakton per plumo kaj \_\_\_\_\_. (R)
28. La urba estraro de Perturbo estas riĉa, do \_\_\_\_ nigra limuzino estas moderna kaj rapida.
29. En la vestiblo staros greka \_\_\_\_\_.
32. En la besto-ĝardeno estas eĉ \_\_\_\_\_. (R)
33. Oni nun diskutas pri la urbodomo. Ĝi estas diskut \_\_\_\_a.
35. \_\_\_\_ da ĝojo karesis la tutan urbanaron. (R)
36. Sur la tagordo estas nur unu ĉefa \_\_\_\_\_.
38. \_\_\_\_ pli ĝi grandiĝas, des pli ili kontentiĝas.
41. Famaj kantistoj kaj riĉaj turistoj venos \_\_\_\_ la urbo.

**Nia enigmo havas du demandojn. Unu estas kompreneble la kaŝfrazo. La dua demando estas jena: en la enigmo figuras tri adverboj, kiuj indikas direktajn. La kvara mankas. Kiu estas la mankanta adverbo? Sendu la kaŝfrazon kaj la adverbon al Juna amiko, HEA, pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario, ĝis la 28a de februaro 1989 por partopreni en loterio kaj eble gajni librojn el Hungario. Donu vian nomon, adreson kaj aĝon.**

## Roloj por la ludo "Perturbo"

**Rikardo Prob:** Vi estas la estro de konstruista kompanio, kiu ricevos la taskon konstrui la koncertejon. Vi uzos la brikojn de via fabriko en la oriento de la urbo kaj la beton-fabriko troviĝas ankaŭ tie. Tial vi volas, ke la koncertejo estu konstruita en la orienta parto de la urbo. Ĝi kostos ok milionojn da jugloj en la oriento sed dek milionojn aliloke, pro la pli altaj transport-kostoj. En la oriento la grundo por la konstruaĵo kostos nur 200,000 juglojn. Eble iu proponos konstrui la koncertejon apud la rivero Pert en la okcidento. Tio estas stulta ideo, ĉar la tero estas tro mola, la ejo sinkus en la riveron ene de unu jaro. La kantistino Natali estas ankaŭ mola, sed ne tro. Vi forte deziras amikiĝi kun ŝi. Via aliancano estas S-ro Sisto; kunlaboru kun li prepare al la ludo.

**Mark Sisto:** Vi estas sindikatestro kaj socia aktivulo. Vi migris el Irlando al Juglando antaŭ 5 jaroj. En Perturbo estas riĉa parto en la sudo kaj okcidento kaj malriĉa parto en la oriento. Tie laboras simplaj laboristoj kaj malriĉaj familioj. Ĉiuj el la publikaj faciligoj – kinejoj, hoteloj, naĝejoj, kultur-centroj ks. troviĝas en la riĉaj partoj de la urbo. Por reegaligi la urbon pli juste oni devas konstrui la novan koncertejon en la oriento kune kun sportejoj kaj kultura centro, kiu proponos kursojn por la laboristoj. Konstrui la koncertejon en la oriento donos multajn postenojn por la laboristoj de la urbo. Se oni konstruos ĝin aliloke, venos laboristoj el la ĉefurbo aŭ eĉ el eksterlando. Kunlaboru kun s-ro Prob.

**Mart Elobat:** Vi estas la prezidanto de la urbestraro. Vi devas gvidi la kunsidon laŭ la instrukcioj donitaj fine de la enkonduko sur p. 7. Vi mem ne havas propran opinion, kie troviĝu la koncertejo. Vi decidis laŭ la kvalito de la argumentoj en la diskuto. Vi atendas, ke la Ministro kaj via sekretario estu same neŭtralaj. Protestu, se ili ne estas. Via estraro estas naŭ-membra. Aldoniĝos la Ministro, s-ro Mamoŝt. Se iu plia alvenos poste, estu tre malkontenta kaj protestu. Vi devos teni ordon dum la kunsido, uzu vian martelon se necese. Memoru, ke vi estas la heroo, kiu batalis kaj gajnis por via urbo la koncertejon! Fine de la rolludo vi kaj la ministro devos decidi, kie staros la koncertejo.

### Ekzerco:

Ni ne rakontis al vi kiel Mart Elobat sukcesis batali kaj gajni la koncertejon por Perturbo, kontraŭ la konkurenco de Kukurbo. Verku rakonton pri tiu batalo kaj sendu ĝin al ni. Ĉu Mart devis ofte veturi al la ĉefurbo? Ĉu li eble veturis al Kukurbo? Kion li faris tie? Ĉu li denove batis la urbestron de Kukurbo? Kial? Kie? Kun kiu rezulto? Ĉu Mart estis vere lerta aŭ nur bonŝanca? Kial la Ministro decidis fine favore al Perturbo?

La amiko, kiu paroligas

# Juna amiko

Ni prezentas *Juna amiko*, la internacia gazeto por komencantoj kaj lernejanoj. Ĝi aperas kvarfoje jare, en februaro, aprilo, septembro kaj novembro, riĉe ilustrita kun du-kolora presado sur 24 paĝoj. Ĝi prezentas rakontojn, scenojn, teatraĵetojn, poemojn, kantojn kun muziknotoj, fablojn, rol-ludojn, dialogojn, raportojn pri Esperanto-klasoj, konkursojn kun premioj, skeĉojn, tabul-ludojn, matematikajn kaj krucvortajn enigmojn, bild-striojn, leterojn de legantoj kaj rubrikon por junaj korespondemuloj. Ĝia lingvaĵo estas simpla (kun klarigoj de malpli simplaj vortoj). Ĝia etoso estas stimula, amuza kaj aktiva. Instruistoj kaj kurs-gvidantoj povos bone uzi ĝin en siaj lecionoj.

Eldonanto: Hungara Esperanto-Asocio, p.f. 193, H-1368 Buda-pest, Hungario.  
Aŭspicianto: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).  
Redaktoro: Stefan MacGill (Novze-lando/Hungario).  
Respondeca redaktoro: Judith Schiller (Hungario).  
Desegnistoj: Pavel Rak (Ĉeĥoslo-vakio) kaj Csilla Borovszki (Hungario).  
Muziknotistoj: Franz-Georg Rössler (FR Germanio).  
Klubo de legantoj: Josef Chvosta (Ĉeĥoslovakio).  
Eldonkvanto: 4000 (3500 pagintaj abonantoj)  
Legata en pli ol kvardek landoj de la mondo.

Lando	1987	1988	Lando	1987	1988
Sovetunio	1148	1468	Usono	7	28
Hungario	837	951	Italio	14	18
Bulgario	240	221	Belgio	7	15
Ĉeĥoslovakio	180	203	Nederlando	17	11
Germana DR	130	161	Aŭstralio	5	9
Jugoslavio	10	102	Kanado	5	8
Britio	18	57	Kubo	5	8
FR Germanio	30	47	Finnlando	6	7
Svedio	5	43	Islando	7	6
Francio	7	37	Irano	5	5
Pollando	5	36	Aliaj	20	58
Israelo	0	31			
Brazilo	17	31			

Pagintaj abonantoj SUME: 2725 3561

Anstataŭ teorie priskribi la principojn de nia revuo, ni prezentas sur la sek-vaj paĝoj mallongan bildstrio: "La insulo", kune kun konkurso. Laŭ tio vi juĝu mem, ĉu indas aboni aŭ reaboni *Juna amiko*.

Por helpi vin realigi vian juĝon, post la bildstrio vi trovos liston de niaj pe-rantoj tra la mondo. Kontaktu vian peranton por amikiĝi kun la amiko!

**Kvalite kaj kvante ni altigu la nivelon de Esperanto-instruado!**  
**Donu al *Juna amiko* centran rolon! Abonu nun!**

## LA INSULO

Ŝipo sinkis. Tri viroj naĝis al insulo. Ili loĝis tie dum du jaroj. La insulo estis tre malgranda kaj ili estis tre malkontentaj.



En la poŝo de la unua viro ili trovis kraĵon. Li estas verkisto.



En la poŝo de la dua viro ili trovis \_\_\_\_\_ paperpecon.

Li estas burokrato.

En la poŝo de la tria viro ili trovis \_\_\_\_\_.

Li estas drinkulo.



Unu el ili subite havis bonan ideon!



Ni skribu mesaĝon sur la \_\_\_\_\_ per la \_\_\_\_\_ kaj metu la mesaĝon en la botelon!

Do ili skribis:



## Konkurso

En la venonta numero de *Juna amiko* ni aperigos plian bildstrion. Ĝia unua panelo estos sama kiel tiu ĉi-paĝe: tri viroj sur dezerta insulo. Sed la daŭrigo kaj la fino estos tute aliaj. Ni invitas vin, ĝis la 30a de aprilo 1989 sendi al ni vian propran bildstrion! Ĝia titolo devas esti "La insulo", kaj ĝia unua bildo sama kiel nia, sed la ceteron vi mem inventu! Skribu kaj desegnu! La plej bonajn ni premios per libroj. Se unu estas tre bona, ni aperigos ĝin poste en la jaro, ĉu kun viaj propraj bildoj (desegnu nigre sur blanka papero), ĉu per belaj

bildoj de nia ilustristo Pavel Rak. Imagu vian rakonton, ilustrita de profesiulo, sendita tra la mondo en nia gazeto en 4000 ekzempleroj. Ek al la desegnado! Ĉi tiu konkurso estas malferma ne nur al abonantoj de nia revuo, sed ankaŭ al ricevantoj de ĉi tiu varbilo. Sed nur junuloj (ĝis 18-jaraj) rajtas konkursi. Bv. indiki vian nomon, adreson kaj aĝon!



Ili metis la mesaĝon en la botelon kaj ĵetis ĝin en la maron!

Poste ili atendis kvar monatojn.



Sed ne alvenis ŝipo, alvenis botelo.

En la kvina monato ili subite vidis ion en la maro.



Ili kaptis la botelon. Ĉu revenis la propra botelo? Ne, ne estis paperpeco en ĝi, estas io alia...



Ve! En la botelo...

## Anoncoj

Anoncoj en la rubriko "Dezirata korespondi" estas senpagaj por junaj legantoj, kiel ankaŭ mallongaj anoncoj pri porlernejanaj renkontiĝoj kaj servoj. Aliaj anoncoj, kun aparta grafika pretigo estas pagendaj.

### Grandeco

Kvaronpaĝo  
Duonpaĝo  
Tuta paĝo

### Okcidente

25 gld. aŭ 3 jarabonoj en via valuto  
42 gld. aŭ 5 jarabonoj en via valuto  
60 gld. aŭ 7 jarabonoj en via valuto

### Soclande

250ft  
420ft  
600ft

## Jardeko-kolekto

Ni proponas kolekton de 28 malsamaj numeroj de *Juna amiko*, ekde numero 1976/2-3 ĝis 1986/3. Tion vi povas mendi ĉe okcidentaj perantoj kontraŭ nur unu jarabono. Mendu klare: "Juna amiko: la jardeko 76-86". En Hungario pagu 50 forintojn al HEA, aŭ 100 ft por donaci tiun jardek-kolekton al eksterlanda amiko. El aliaj landoj nur mone antaŭpagitaj mendoj estas akcepteblaj.

Laŭ la sama prezo kaj kondiĉoj ni povas proponi klas-kolekton de 30 ekzempleroj de unu numero ene de tiu periodo. Specifigu, kiun numeron vi deziras. Oferto validas nur dum restas stoko.

## PERANTOJ DE JUNA AMIKO

Nia ĉefa internacia peranto estas Universala Esperanto-Asocio. Vi povas pagi al ilia Centra Oficejo rekte en guldenoj, sed ankaŭ multaj el iliaj landaj perantoj akceptos abonojn en via enlanda valuto. En pluraj soc-landoj la abonoj estas perataj tra la poŝto; en multaj aliaj landoj ni nun havas proprajn perantojn. Jen listigo, kun la prezoj de la abonoj. La unua cifero estas tiu por unuopa jarabono (4 numeroj). La postaj ciferoj estas la po-abona kosto por kolektivaj abonoj por respektive 3 ĝis 7, 8 ĝis 29 kaj ekde 30 ekzempleroj. La sola escepto estas Hungario.

Internacia: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (pĉk. 378964). 8,40 gld., 7,50 gld., 7,00 gld., 6,00 guldenoj.

Migranta: Jorgos, ĉe la biciklo laŭ la enlanda tarifo.

Aŭstralio: Sylvia Burkitt, 20 Grandview St., Parramatta, NSW 2150. \$A7,50, 7, 6,50, 6 aere.

Aŭstrio: Ni traktas kun IEMW, Hofburg, A-1010 Wien 1.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. 175BEF, 160BEF, 150BEF, 140BEF.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, BR-70084 Brasília (DF). 8,40; 7,50; 7,00; 6,00 gld. Pri enlanda tarifo decidus BEL.

Britio: P. Hewitt, 26 Highfield Rd, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside, DN36 5RT. 2,80; 2,50; 2,30; 2,00 pundoj.

Bulgario: ĉe Bulgara Esperanto-Asocio, kiu kolektive mendas de HEA.

Ĉeĥoslovakio: Ekde septembro ĉe PNS, dovoz tisku, Dlouhá 12, CS-110 01 Praha 1 por Ĉeĥio (tel. 42 2 2316795, kataloga n-ro 25423). PNS, nám. K. Gottwalda 6, CS-813 81 Bratislava por Slovakio.

Ĉinio: Ni traktas kun ĈEL pri interŝanĝaranĝo.

Francio: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris. 26; 24; 22; 20FF.

FR Germanio: Esperanto-Centro Paderborno, Grünigerstr. 5, D-4790 Paderborn, kaj J. Pachter, Zum Kreuzbühl 16, D-7480 Sigmaringen. 7,50; 7,00; 6,00; 5,00 DM.

Germana DR: Ĝis la 1-a de septembro ĉiujare ĉe Post u. Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb u. PZV, Übigauer Str. 4, DDR-7900 Falkenberg (mendonumero Z 0230-1318).

Hungario: Ĉe ĉefaj poŝtoŝtupoj aŭ rekte ĉe HELIR, Lehel u. 10a, H-1900 Budapeŝto, prefere antaŭ la jarfino. Jarabono 40 forintoj. Donacabono por eksterlandanoj 48 ft. Kolektivaj kaj malfruaj abonoj kaj mendoj de malnovaj numeroj ĉe "Juna amiko", p/a HEA, pf. 193, H-1368 Budapeŝto. Malpli ol 8 ekzempleroj al unu adreso: po 45 ft. 8 ĝis 14 ekz.: po 40 ft. 15 ĝis 29 ekz.: po 36 ft. Plu ol 30 ekz. po 34 ft.

Israelo: Aviv Faklieru, P.O.K. 8383 Tel-Aviv-Jaffa, IL-61083.

Japanio: Ni traktas kun Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzjuju-ku, Tokyo-to, 162.

Jugoslavio: Terezija Kapista, Studentska 39/23, YU-11090 Novi Beograd. Tarifo anoncota.

Kanado: Merle Haltrecht-Matte, 7083 rue Notre Dame, Orléans, Ontario, K1C 1J1.

Kubo: Ni traktas kun Kuba Esperanto-Asocio.

Pollando: Abonado tra RSW ankoraŭ ne eblas. Intertempe turnu vin al PEA aŭ la ILEI-sekcio, p/a H. Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92-547 Lodz.

Sovet-Unio: Distribuo okazas oficiale de ĉ. mil ekzempleroj, kiujn ASE porciigas inter la respublikoj. La mendado okazas en ĉ. septembro por la posta jaro.

Svedio: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, pl. 455, S-24 292 Hörby. 30, 28, 26 kaj 24 SKR.

Svislando: Esperanto-perantejo Bern, Weingartstr. 21, CH-3014 Bern. Tel.: 031-427156. 6; 5,50; 5; 4,50 SFR.

Usono: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. \$4,50; 4,25; 4,00; 3,75. aere.

Venezuelo: J.E. Bachrich, Apdo 3833, Caracas 1010 A.

**Mendu nun amase por la venonta jaro; estu firma amiko de la juna amiko!**

## Roloj por la ludo "Perturbo" (norduloj kaj centristoj)



**Natali Kar:** Vi estas la plej elstara oper-kantisto de Perturbo. Via voĉo estas rave bela — unu el la plej belaj en la tuta universo, almenaŭ laŭ via propra juĝo. Vi loĝis dum via tuta vivo en la nordo de la urbo, kiu estas la plej bela kaj plaĉa parto. La oriento estas industria kaj la sudo tro komerca. Vi loĝas apud la rivero Pert, kiu estas pura kaj bela. Se la koncertejoj troviĝus apud ĝi, tio estus tre ĉarma. Krome, ĝi troviĝus apud via hejmo. Kiam venos mondfamaj muzikistoj, vi povos inviti ilin ĉe vi kaj iĝi tutmonde konata. Vi jam imagas vin sur la podio — purpuraj estos la kurtenoj, ĉar tio harmonios kun viaj oku-

loj. La konstruisto s-ro Prob ankaŭ interesiĝas pri viaj okuloj, kaj ne nur tiuj. Sed vi trovas lin senkultura kaj ne-agrabla.

**Gregore Gisto:** Vi estas la direktoro de la bestoĝardeno en la urba parko en la nordo. La bestoĝardeno malbone fartas — la leonoj eskapis, la ĝirafo mortis kaj eĉ la ridantaj hienoj havas melankolion. Vi urĝe bezonas ion por logi pli da homoj al la bestoĝardeno. Unu angulo de la ĝardeno estas libera — malantaŭ la kaĝo de uroj\* — kaj vi pretas donaci tiun terpecon por la koncertejoj. Tiel, ili ŝparos almenaŭ unu milionon da jugloj, kompare kun konstruado en la sudo. Antaŭ koncertoj, la vizitantoj povos viziti la bestojn.

**Levita Peron:** Vi estas la estro de la ĉefa fervoja stacidomo meze de Perturbo. De via stacidomo la linioj iras al la ĉefurbo, al Kukurbo kaj al la okcidenta landlimo. Se la koncertejoj estus konstruita tuj apud la stacidomo, muzikamantoj povus facile alveni per trajno, eĉ el eksterlando, ĉar ĵus trans tiu okcidenta landlimo situas Predurbo, kie loĝas multaj kultur-vulturoj. Tiel, pli da personoj vojaĝos per trajno kaj malaperos la risko, ke oni fermos vian stacidomon kaj maldungos vin. Vi havas eĉ pli brilan ideon: konstrui la koncertejon *super* la stacidomo. Sur ĉiu perono povos esti lifto, por levi la pasaĝerojn tuj de la trajno en la koncertejon. Fortaj arganoj funkciigos la liftojn. Ĝi estas brila ideo, vi eĉ emus kanti pri tio!\*\*

\* Se tiuj bestoj volus ĉeesti koncertojn, ili devus nur konvertiĝi al iu mistika religio; ili tiel iĝus kult-ur-itaj!

\*\* Evita Peron kantis "Ne ploru por mi Argentino". Li kantis: "Ni gloru pro mia argan-teno!"

podio: la loko en koncertejoj, kie staras la artisto.  
melankolio: granda malĝojo.  
uro: bovo-simila besto  
juglo: la mon-unuo en Juglando  
perono: kie pasaĝeroj staras, kiam alvenas la trajno.

kultur-vulturo: homo, kiu tre ŝatas kultur-raĵojn, kaj ilin voras kiel vulturo voras (manĝegas) viandon.  
argano: lev-aparato, gruo.  
maldungi: forpreni de iu la labor-postenon.  
landlimo: la loko, kie oni vojaĝas de unu lando al alia

# La LARVINO

Loĝas sub la ŝel' de pino  
la larvino kun filino.

Ŝia edzo en ferio  
falas suben de folio  
kaj post tiu ĉi tragiko  
formanĝiĝis de formiko.

La larvino iun tagon  
diris: "Jen mi vidas fragon.  
Mi ĝin prenos, mia ido,  
ĝin alportos, ĝis revido!  
Ho, mi nun ankoraŭ diru:  
Memoru paĉjon — ne foriru!"

Post patrino malapero  
la filin' sen konsidero  
nun forrampis — erarego!  
Ĉar alvenis bunta pego  
kaj la larvineton glate  
ĝi formanĝis, senkomplete.

Ploras sub la ŝel' de pino  
la larvino pri l'filino...

*Verkis: Heinz Erhard  
Tradukis: Ulrich Mattias, F.R. Germanio*

pino: arbo kun nadlo-formaj folioj, kiuj ne forfalas vintre.  
larvo: animalido; raŭpo; praformo de papilio aŭ insekto.  
frago: bongusta ruĝa frukto, kun multaj semetoj sur la ekstero.

pego: birdo, kiu emas frapi kontraŭ arbotrunkon per sia longa kaj forta beko (kaj manĝi larvojn!)



Pavel  
Rak

## Roloj por la ludo "Perturbo" (suduloj kaj moŝto)

**Artur Ismad:** Vi estas la ĉefo de la urba turisma oficejo kaj komercisto. Aliaj en la kunveno estas artistoj, kaj nenion komprenas pri la vera mondo kaj ekonomiko. Konstrui koncertejon estas grava komerca ago, kio influos la ekonomion de la tuta urbo kaj regiono. Ĝi devas altiri multajn turistojn. Ili devas loĝi ie. La logika loko estas en la sudo, apud preskaŭ ĉiuj el la luksaj hoteloj kaj apud la flughaveno (ĉar la bonvenaj turistoj — tiuj, kiuj elspezos multan monon — venos per aviadilo, ne per trajno). La oriento estus la plej katastrofa loko, kun malpura aero kaj malbelaj fabrikoj. La propono pri la bestoĝardeno estas stulta, pro la bruo de la bestoj dum koncertoj. Same, la propono pri la stacidomo, pro la bruo de trajnoj. Estas bona tereno apud la flughaveno en la sudo, kaj kvankam ĝi kostos milionon da jugloj (pli ol aliloke en la urbo), la ekstraj enspezoj pro la riĉaj turistoj kovros tiun ekstran koston ene de kelkaj jaroj. Vi jam planas novan koloran broŝuron: "Perturbo — la aperta urbo" kaj ankaŭ (sekrete) uzi la enspezojn pro la koncertejo por konstrui brilan novan turisman oficejon ... en la sudo, kompreneble.

**Mira Portos:** Vi estas la sekretario de la estraro. Estas via tasko protokoli, tio estas, noti koncize ĉiun ĉefan argumenton dum la diskuto. Fine, la prezidanto petos vin resume raporti pri la kunveno, dum maksimume tri minutoj. Do, vi verŝajne ne partoprenos la diskuton multe, sed vi firme opinias, ke la sudo estas la plej bona loko por la koncertejo. Dum via raportado, emfazu la argumentojn favore al la sudo kaj mallaŭdu tiujn por la aliaj urbopartoj. Vi loĝas en la sudo kaj posedas hotelon. Ĝi estas kutime nur duonplena, sed se oni konstruos koncertejon apude, ĝi estos ofte plena. La orkestrestro posedas terpecon en la okcidento, kiun li proponos por la koncertejo. Li aĉetis ĝin antaŭ tri jaroj. Ĉiuj vendoj devas esti registritaj en la urbodomo kaj ĉar vi estas la sekretario de la estraro, vi scias, ke li pagis nur 50 000 juglojn por ĝi.

**Reĝi Mamoŝt:** Vi estas la Ministro el la ĉefurbo. Vi venis al Perturbo por partopreni la kunsidon kaj esti certa, ke oni saĝe decidis kaj ne disputos. Vi volas certigi, ke la estraro de Perturbo estas kapabla, kaj ke la posta organizado glate progresos. Vi konas nur la sudon kaj la centron de la urbo, ĉar vi ĉiam alvenas aviadile. Tio ŝajnas al vi logika loko por la koncertejo. Via registaro estas regule atakata de la sidikatoj, kaj vi nepre ne volas, ke ili ludu rolon en la konstruado aŭ decidado pri ĉi tiu projekto.

Vi jam decidis, ke oni ne konstruos la koncertejon en Kukurbo,

ekonomiko: la scienco pri mon-aferoj  
elspezi: foruzi monon  
tereno: ter-peco  
broŝuro: libreto  
argumento: fakto uzata por konvinki iun pri io  
emfazi: substreki, elstarigi  
registri: oficiale noti  
sindikato: asocio por protekti la rajtojn de laboristoj  
interkonsenti: veni al komuna decido



sed vi tamen sekrete invitis la urbestron de tiu urbo, s-ron Podi, viziti la kunvenon. Li alvenos malfrue. Nur kiam li aperos, klarigu, ke vi invitis lin. Vi suspektas, ke la estraro ne povos pace diskuti kaj ne povos atingi rezulton. Vi venigis la urbestron de Kukurbo, por ke vi povu minaci la perturbarojn forpreni de ili la koncertejon kaj doni ĝin al Kukurbo, se ili daŭre kverelos. Vi ne vere faros tion, sed la minaco devigos ilin rapide decidi kaj ĉesigi la bataladon.

---

Popola fablo el Sudano:

## Elefanto kaj antilopo

La bestoj volis labori. La antilopo diris al la bestoj:

”Venu, labori en mia domo!”

Diris la elefanto:

”Ne, prefere venu labori en mia domo!”

La bestoj konsentis labori en la domo de la elefanto.

”Bone,” diris la antilopo: ”se tio okazos, mi konfuzos la laboron.”

La antilopo prenis harpon, sidiĝis apud la strato kaj komencis harpi. La bestoj irantaj sur la strato ĉirkaŭis ĝin kaj komencis danci kaj kanti. Post la dancado ili sidiĝis apud la antilopo kaj eĉ ne pensis pri la laboro. La elefanto venis kaj demandis:

”Kio okazis? Kial vi ne venas labori en mia domo?”

”Mi diris al la bestoj, ke ili venu labori por mi,” diris la antilopo: ”sed vi diris: Ne! Pro tio mi konfuzis ilian laboron.”

”Vi pravas,” diris la elefanto.

De tiam la bestoj ne plu laboras.



*El la hungara tradukis  
Jozefo Németh, Pápa*

antilopo: afrika besto, kiu kapablas salti. Malpli granda ol elefanto.

elefanto: afrika besto kun longa nazo. Pli granda ol antilopo.

harpo: muzika instrumento kun multaj kordoj. Pli malgranda ol piano, antilopo kaj elefanto.

konfuzi: ĝeni, malordigi.


Por la etuloj:

## Ni desegnu kune!


Jen pilkego granda-granda,  
kaj pilketo sursidanta  
supre jen du maŝoj nestas,  
eĉ la vosto ne forrestas,  
verdajn herbojn ni almetas —  
la *kuniklo* paska pretas.



Kio kuŝas tiel mute?  
Jes ja, pano, freŝa tute.  
Ĵusbakita, brune ora,  
tre bongusta, bonodora.  
Panpeceton ni detranĉu,  
tamen ĝin ni nun ne manĝu,  
sed okul- kaj oreldojn,  
ni desegnu la lipharojn.  
Malantaŭe estas pluso.  
Manĝas panon nun... la *muso*.



El la germana tradukis  
Imre Szabó, Hungario



Du panoj rondaj-rondaj  
du pintoj montaj  
kaj kolbaso por la plado. —  
Atentu,  
silentu,  
vin ne portu for la *kato!*



**Joĉjo en la kuvo**  
Fari benkon estas nulo:  
du piedoj kaj tabulo.  
Ni surmetu kuvon pene.  
Vidu: estas Joĉjo ene!  
Ni desegnu nur vizaĝon,  
ni ne vidas ceteraĵon.  
Liaj kruroj, ho, aperas,  
kun la akvo tre kverelas —  
tio lin ja amuzegas:  
ĉio ĉirkaŭ li malsekas.

# Korespondi deziras

## Germana DR:

Kathrin Dietze, Wiebelskircher Weg 48, DDR-1165 Berlin. 17-jara, dez. korespondi tutmonde pri literaturo, historio, turismo, modo kaj arto.

## Hungario:

Kiss János, Hódtó u. 4 2/7, H-6800 Hódmezővásárhely. 17-jara, tutmonde, ĉ.t.

Menhárt László, Petőfi út 2, H-8741 Zalaapáti. 13-jara, tutmonde pri muziko, sporto, matematiko kaj ĉ.t. Interŝanĝos poŝtmarkojn, kalendarojn, bildkartojn kaj matricojn.

## Irano:

Colam Reza, P.O. Box 345, Bandar Mahshar. 20-jara, ĉ.t., interŝanĝos poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

## Jugoslavio:

Galic Natasa, I belcina 6, YU-41000 Zagreb. 11-jara knabino.

Abramoviĉ Anita kaj Alen, Ĉrnomerac 94, YU-41000 Zagreb. 11-jara knabino kaj 10-jara knabo.

Mahnet Tomislava, Šestinski dol, Prevoj 2, YU-41000 Zagreb. 12-jara knabino.

Petrak Zeljka, Bijenik, Vatrogaski put 161, YU-41000 Zagreb. 11-jara knabino.

Grah Davor, Dolski put 16, YU-41000 Zagreb. 10-jara knabo.

Juresa Iva, Bademovac 29, YU-41000 Zagreb. 11-jara knabino.

Esperanta grupo, Osnovna skola "Nikola Luketiĉ-Kozarĉanin", Strma cesta 15, YU-41000 Zagreb. 10 ĝis 15-jaraj grupanoj deziras kontaktojn kun similaj E-grupoj.

## Pollando:

Gabriela Larm, Marcinkowo 32, PL-11-700 Mragowo, Woj. Olsztyn. 16-jara. Interesiĝas pri muziko, ŝatas la fratojn Herrey el Svedio.

Adam Solak, ul. Kottataja 19/7, PL-45-064 Opole. 8-jara, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Ludas violonon kaj volas interŝanĝi notarojn.

## Sovet-unio:

Kazanceva Satalia, 40let pobjedi 7-32, SU-665770 Ustj-Flims k. 14-jara lernantino, kolektas bildkartojn; dez. korespondi tutmonde.

Ira Kravĉenko, ul. Ostrovskogo 23, kv. 14, SU-340120 Doneck. 12-jara. Dez. korespondi

kun knabinoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Egiptio, Francio, Germana DR, FR Germanio, Jugoslavio, Koreio kaj Rumanio pri bestoj. Kolektas bildkartojn de katoj, hundoj kaj delfenoj.

Staršov Stanislav, ul. Kornejĉuka 48-A-20, SU-127543 Moskva. 15-jara, tutmonde, ĉ.t., precipe muziko, lingvoj, turismo.

Malcev Gleb, Proletarskaja 71, SU-326520 Ĉjurupinsk. 15-jara, tutmonde.

Vladimir Lelmeĵ, ul. Sodruĝstva 41/1-108, SU-344103 Rostov-Don. 14-jara, tutmonde pri vojaĝoj, lingvoj kaj aliaj temoj. Kolektas bildkartojn de urboj kaj muzik-ensembloj kaj poŝtmarkojn de birdoj.

Majorov Pavel, ul. Ŝkapenko 11-24, SU-324029 Krivoj Rog 29. 15-jara lernanto en teknika lernejo. Tutmonde, ĉ.t.

Ogakova Jana, Mira 65, kv. 237, SU-665770 u. Usti-Himsk. 15-jara, komencantino el orienta Siberio. Volas korespondi kun junuloj el Usono, Hindio, Meksikio kaj Okcidenta Eŭropo, pri natur-protektado kaj paco.

Interklubo "Esperanto" en mezlernejo: Interklubs Esperanto, 72 vidusskola, str. Orlova 6, SU-226065 Riga 65, Latvio. Deziras kontaktojn kun gejunuloj tutmonde, kun lernejoj kaj kluboj de Internacia Amikeco. Interŝanĝas bildkartojn, turismajn prospektojn kaj materialojn pri populolo de la mondo.

Ĉajkin Vadim, p.k. 24, Hersonskaja obl., SU-328520 u. Ĉjurupinsk. 15-jara, tutmonde pri E-novajoj kaj literaturo kaj muziko. Kolektas esperantaĵojn kaj bildkartojn.

Laima Vilkelyte, Zeimiy takas 1-18, SU-235000 Jonava, Litovio. 19-jara, kolektas bildkartojn kaj kalendarojn.

Agne Pruunlep, Redise 6-33, SU-203054 Tallinn Laagri, Estonio. 15-jara junulino, kolektas bildkartojn kaj gluetikedojn, ŝatas naĝadon.

Se vi vizitos Litovion, konatiĝu kun la klubanoj de "Juneco" en la ĉefurbo Vilnius. Ili gvidos vin en la urbo, konatigos ĝian historion, nuntempon kaj E-movadon. EK "Juneco", a.d. 61, SU-232000 Vilnius, Litova SSR.

Janis Minats, Brivibas b. 28-49, SU-229600 Jelgava, Latvio. 13-jara knabo, ĉ.t., kolektas poŝtmarkojn kaj insignojn.

Sandra Ljepina, Obuhova 9-22, SU-229600 Jelgava, Latvio. 13-jara knabino, ĉ.t., precipe teatro.

Inese Kirse, Lietuvas 1-30, SU-229600 Jelgava. 13-jara knabino.

Kaspars Vitins, Brivibas b. 39-42, SU-229600 Jelgava. 13-jara knabo.

Pazniokaite Ramune, Vairuotoju 5-14, SU-234930 Anyšćiai, Litovio. 16-jara junulino, ĉ.t.

Budnikaite Rasa, Vorutas 14, SU-234930 Anyšćaia. 16-jara junulino, ĉ.t.

Bekintyte Asta, Vaijganto 17-1, SU-234930 Anyšćaia. 16-jara junulino, ĉ.t.

Esperanto-klubo "Stela papageto", Pionir-palaco, str. Palekic 43, SU-236000 Vilnius, Litovio, volas starigi cirkuligeblan ekspozicion de infan-desegnaĵoj kaj pentraĵoj: "Per Esperanto por mondpaco kaj amikeco". Bv. sendi desegnaĵojn kaj pentraĵojn ĝis aprilo 1989. Danilov Tea, str. Kopli 21-6, SU-203170 Haapsalu, Estonio. 9-jara lernantino.

Loomets Imbi, str. Tüve 1, SU-203170 Haapsalu. 9-jara ino.

Tennisberg Targo, str. Kastani 24-5, SU-203170 Haapsalu. 9-jara lernanto.

Belik Inna, ul. Ostrovskogo 24, kv. 131, SU-340120 Doneck 120. 12-jara lernantino, ĉ.t., interŝanĝas kalendaretojn, bildkartojn.

ĉ.t. = pri ĉiuj temoj

## NOVA PREMIO EN JUNA AMIKO

Ni anoncas la lanĉon de nova kaj valora premio en nia revuo: Stultulo de la kvaronjaro. La unua gajninto estas la redaktoro. Li faris tre stultan eraron en la lasta numero de la revuo, ĝuste ĉe la koresponda rubriko. Venis la unua peto el Usono eĉ de tuta grupo de junaj lernantoj. La redaktoro bele listigis la nomojn, la aĝojn kaj la interesojn, sed forgesis aldoni la adreson. Kiom el vi skribos al ni por atentigi nin pri tio? Mi raportos en la posta numero. Ĉiukaze, ĵen la kompletigitaj informoj:

### Usono:

Sep lernantoj el mia E-kurso, Joan Acosta, Jatara Barrett, Tikisha Howard, Danielle Keys, Adam Kruppa, Marzina kaj Ark Pachnik kaj Crystal Rowe, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Ili estas inter 7-kaj 11-jaraj kaj interesiĝas pri geografio kaj kutimoj. R. Kent Jones, 5048 North Marine Drive, Ap. D-6, Chicago, IL 60640, Usono.

## Konkurso pri gardistoj!

Iam estis kastelo. En ĝi vivis reĝo kaj reĝino kun unu beleĝa filino. Ili volis trovi por ŝi inteligentan edzon. Do, ili starigis teston de inteligenteco. Ili ŝlosis la princon en unu ĉambro, kaj en la najbara ĉambro ili ŝlosis la kastelan ekzekutiston. Se mi klarigas, ke ekzekutisto estas mortigisto, mi ne nur ŝparas piednoton, sed ankaŭ avertas vin pri la speco de rakonto, kiu sekvas. Ĉiu ĉambro havas nur unu pordon, la du pordoj estas identaj. Estas neniuj fenestroj. La pordoj ne estas vitraj. Antaŭ ambaŭ pordoj staras gardisto, la du gardistoj estas identaj en ĉio, krom en unu grava afero: unu ĉiam diras la veron, la alia ĉiam mensogas. Senescepte. Viro, kiu volas edzinigi la princon rajtas veni, sed li rajtas starigi nur unu demandon al unu el la gardistoj. Post tio, li devas elekti unu el la pordoj. Eble li elektos la bonan, sed eble li elektos tiun, kun la ekzekutisto. En tiu kazo, la kolo kaj la kapo de la juna heroo abrupte adiaŭos unu la alian. "La princino ja estas bela, sed mi ne volas perdi mian kapon pro virino" diris la viroj, kaj forestis.

Sed unu inteligenta juna belaspekta heroo alvenis kaj proklamis: "Mi elpensis bonan demandon, kaj per tio mi tute senriske povos elekti la ĝustan pordon!" Li starigis la demandon, aŭskultis la respondon, elektis pordon kaj tuj falis en la brakojn de la feliĉa princino. Ne necesas aldoni, ke ili vivis feliĉe ĉiam poste. Por ke vi ne vivu feliĉe eĉ dum mallonga tempo poste, ĵen nia demando al vi: Kiun demandon la heroo povis starigi por esti tute certa pri la elekto? Estas pli ol unu respondo. Sendu vian poŝtkarte aŭ letere al *Juna amiko*, p.f. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario, ĝis la 28a de februaro 1989. Vi rajtas sendi la respondon kune kun tiu de la krucvortenigmo sur paĝo 8.



La rubrikon gvidas Josef Chvosta, Leninova 16, CS-29001 Podebrady, Ĉeĥoslovakio. Sendu ĉiun korespondaĵon kaj respondojn rekte al li.

## Sekreta lingvo

Kiam Karolo volis, ke liajn leterojn aŭ skribaĵojn komprenu nur tiuj, kun kiuj li tion estis konsentinta, li uzis sekretan lingvon. Li elpensis eĉ du tipojn, kiuj estas iel bazitaj sur Esperanto. Kompreneble oni ilin pli bone povas skribi ol paroli. Ĉu vi povas kompreni tekstojn skribitajn en tiu sekreta lingvo? Karolo sendis salutkartojn el sia vojaĝo:

Lese enolu,  
No ŝemaveŝ zop im noe zuĵehu. No  
zobovoŝ noeĵap ĝiuplamujap lej siŝvoŝ  
voi limeĵap veĝeĵap.

Zoe Karolo

Ĵupu uleĵi,  
Le rukoŝur tem ak leu tiĥugi. Le te-  
veŝer leuĥam faimĵakiĥam ĵuĥ parŝer ŝea  
ĵakĵuĥam ŝufiĥam..

Teu Karolo

Legu, kion Karolo skribis. Laŭ la supersignoj vi povas vidi, ke ambaŭ tipoj estas bazitaj sur Esperanto, eĉ se la pronancado ne estas facila. Vi certe baldaŭ solvos la tekston kaj la principon, kial oni pli bone povas skribi ol legi ilin.

Sendu vian solvon al la supra adreso, eĉ kun kelkaj vortoj en tiu sekreta lingvo aŭ prinskribo de la principo. Ĉiuj solvoj estos rekompensitaj per belaj poŝtkartoj. Sendu viajn respondojn kiel eble plej baldaŭ!

## Roloj por la ludo "Perturbo" (la okcidentuloj kaj iu pli)

**Lavang Ardul:** Vi estas arĥitekto, kiu planos la koncertejon. Ĝi estos ultra-moderna, kun kolonoj, fenestretoj kaj arkoj. Kompare, la Centro Pompidou en Parizo aspektas tradicie kaj seninspire. Ankaŭ la ena dekoro estos okul-frapa. Vi imagas la kurtenojn okre. Ĉirkaŭ la rando de la halo estos vazetoj, ĉiu kun nur unu floro. En la vestiblo staros meze vazego — greka urno kun multaj floroj. La vestiblo staru sur kolonoj super akvo. La fenestretoj donos belan super-rigardon nokte, kiam la lampoj ĵetos lumon sur la akvon. Klarigu viajn planojn pri la konstruaĵo. Estos problemo konstrui apud akvo, ĉar la grundo povos esti mola, sed vi havas specialan ilon por malmoligi la grundon. La rivero en la okcidento estos bona kaj eleganta loko konstrui la koncertejon. Ne nur la konstruaĵo devas esti impona sed ankaŭ ĝia ĉirkaŭaĵo.

**Diap Anton:** Vi estas la dirigento de la filharmonia orkestro de Perturbo. Vi estas krea artisto. Vi komponas muzikon kaj poemojn. Vi verkos specialan poemon "Odo al nia urbo", kiun vi deklamos en la inaŭguro, dum ludos la orkestro kaj kantos s-ino Kar. Antaŭ ruĝa kurteno vi tre impone aspektos. Vi aprobas la ideon de la arĥitekto konstrui la koncertejon en la okcidento; ĝi estas la sola kulturita parto de la urbo. Kompreneble vi loĝas tie. Hazarde, vi posedas terpecon apud la rivero, kiu estos ideala loko. Vi sekrete aĉetis ĝin antaŭ tri jaroj kontraŭ 50 000 jugloj, kaj nun vi facile povos vendi ĝin al la urbo kontraŭ 500,000 jugloj — en la sudo simila terpeco kostus unu milionon.

**Ante Podi:** Vi estas la sekreta lasta alvenanto. Komence de la kunveno vi ne ĉeestas. Vi eniros, kiam la gvidanto de la rol-ludo tion indikos. Vi estas la urbestro de Kukurbo, el la sudo. La Ministro, s-ro Mamoŝt, invitis vin. Envenu kaj tuj prezentu vin. Memoru, ke Perturbo, kaj ĝia ruzaĉa urbestro, s-ro Elobat, forŝtelis ala koncertejon de via urbo. Kukurbo ja estas la dua plej granda kaj logike ĝi devus ricevi la koncertejon. Fakte, vi pli volonte ricevus monsumon, per kiu konstrui olimpikan stadionon. Vi ne interesigas pri muziko kaj teatro. Vi estas kontraŭ-podia. Sed vi nepre ne volas, ke Perturbo ricevu la koncertejon, kaj nun estas lasta ŝanco por vi. La Ministro certigis al vi, ke se la peturbanoj ne povos decidi kie en la urbo konstrui ĝin, li redonos la projekton al via urbo. Aŭskultu la diskutadon, kaj se okazas ĉefe bataloj, insistu, ke la Ministro plenumu sian promeson.

### Ekzerco por komponistoj

Anton verkis "Odo al nia urbo". Odo estas longa poemo. Vi verku poemon pri via urbo. Ne nepre longa. Eble la linioj rimigos. Eble vi aŭ iu en via grupo povos verki melodion por ĝi. Se vi studas en klaso, formu kelkajn grupojn kaj ĉiu verku poemon aŭ kanton pri via urbo. Prezentu ilin unu post unu kaj decidu, kiu estas la plej bona.